


# LA JUNNA VIVO



REDAKCIO KAJ  
ADMINISTRADO:  
WEST-GRAFTDIJK  
(N.H.) NEDERLANDO  
GIRONUMERO 209354 NEDERL.

JARABONO:  
NEDERLANDO:  
0,80 GULDENO  
ALIAJ LANDOJ:  
14 FR.FR.; 0,70 DOL.; 2,15V.FR.


FRANCO

## MONATA ORGANO POR LA JUNULARO KAJ KOMENCANTOJ

### REMEMOROJ PRI MIA PATRO de Adam Zamenhof.

Mi estas preskaŭ samaĝulo de Esperanto, ĉar nur unu jaron pli juna. Mi memoras la plej fruan epokon de la lingvo kiel knabo

1887



1937

eble kvinjara. Kiam mi tro brue ludis kun mia fratino aŭ tro laŭte ploris (tio ja povas okazi al ĉiu infano), la patrino atentigadis nin per admono : „ Silentu, infanoj, vi ja scias, ke la patro skribas, kaj

vi malhelpas al li!" Ni ne tre bone komprenis, kion skribas la patro, sed ni efektive povis multfoje konvinkiĝi, ke li preskaŭ ĉiam estas okupita apud sia skribotablo, ŝarĝita de multaj dikaj libroj. La laborĉambro de la patro estis konsiderata kiel sanktejo, kiun oni rajtis viziti nur kun speciala permeso kaj en specialaj okazoj. Tamen ĉiuvespere ni rajtis tien eniri por diri al la patro „bonan nokton". Tio estis la unuaj Esperantaj vortoj, kiujn ni konis, kaj pri tio ni estis tre fieraj, pensante, ke ni uzas lingvon parolatan nur de grandaj personoj, aŭ nur de tre saĝaj infanoj.

Mi ĉiam konservas en mia memoro la bildon de la patro, okupita kaj laboranta. Nur dum la tagmanĝo kaj vespermanĝo ni havis okazon iom babili kun li. Li estis preskaŭ ĉiam serioza, sed tamen tre bonkora kaj afabla. Estis granda ĝojo por ni, se ni povis elvoki rideton sur lia vizaĝo. Kiam ni estis kulpaj de ia infana malsaĝeco, la patrino foje minacis, ke ŝi diros pri tio al la patro, kaj kvankam ni sciis, ke li ne krios, kaj eble eĉ ne koleros, ŝajnis al ni hontinde, se la patro eksciis pri nia malsaĝeco. Li havis speciale konvinkantan manieron paroli kun ni pri la principoj de bona agado, donante ekzemplojn el la fabeloj aŭ el sia propra vivo. La mensogon li konsideris kiel la plej gravan malvirton, kiu ĉiam finiĝas per honto.

Kvankam li estis tre tolerema por la eraroj de aliaj homoj, li tamen postulis en nia edukado ke ĉiu kulpo estu punata. La punon li konsideris kiel tute naturan agon de justeco, sed neniam kiel venĝon, por kiu li ĉiam sentis abomenon. Jam la ĉagreno pri la malbona ago povis esti sufiĉa puno. La konscio pri ĉagreno, kiun nia malbona agado kaŭzis al la gepatroj, estis ankaŭ kvazaŭ morala puno por ni. Se la kulpo estis pli granda, ekzemple, se okazis, ke ni malobeis al la patrino (al la patro ni obeis ĉiam), sekvis puno pli granda — la starigo en la angulon de la ĉambro. Oni devis resti tie ĝis la permeso forlasi la punlokon. Tiam ni petis pardonon, promesis ne plu esti malobeema. Nun sekvis la kiso kaj la kulpo estis pardonita, kvazaŭ laŭ regularo. Unufoje okazis, ke mi estis starigita en la angulon, sed la patro forgesis pri tio kaj eliris el la domo, ne liberiginte min el la angulo. Mi komprenis, ke tio estas nur senscia maljusteco, kaj dume forlasis la angulon kaj amuziĝis kun mia fratino. Sed kiam mi aŭdis, ke la patro revenas hejmen, mi tuj reokupis la punlokon, kvazaŭ mi tie restis tutan tempon.

Oni rakontas pri iu dentisto, kiu ordonis al la paciento resti kun malfermita buŝo post la operacio. La dentisto foriris el la ĉambro

kaj dume estis invitita de siaj konatuloj por ludi briĝon. Dum la ludo li rememoris pri la paciento kaj tuj kuris hejmen. La paciento sidis ankoraŭ kun malfermita buŝo kaj preskaŭ svenis. La dentisto kvazaŭ trankvile eniris en la ĉambron, elfiris la poŝhorloĝon kaj diris : „Nu, ankoraŭ unu minuton, kaj vi povos fermi la buŝon”. — Sed mia patro estis tro honesta por agi sammaniere. Mi rimarkis grandegan konfuzon sur lia vizaĝo. Mi vere kompatis lin kaj tuj konfesis mian ruzon. Tiam la patro diris : „Vi ne agis honeste, venante el la angulo sen permeso, ĉar vi ne povis esti certa, ke mi ne lasis vin tie intence tiel longe. Sed aliflanke vi honeste konfesis vian nelojalecon. Tial mi pardonas al vi. Tamen estu ĉiam lojala en estonteco, ĉar sen lojaleco kaj reciproka fido ne povas esti ordo inter la homoj”. Sajnas al mi, ke post tiu fakto mi neniam plu staris en la angulo.

Granda optimismo karakterizis mian patron dum lia tuta vivo. Tiu pensmaniero helpis al li en sia laboro por Esperanto kaj permesis al li kontraŭstariĝi al la oftaj malsaĝaj kritikoj kaj eĉ moko, precipe dum la unua epoko de la ideo. Kontraŭ la moko la plej efika armilo estas la konscio de propra praveco. Tiamaniere konsolis min la patro, kiam mi unufoje revenis kun larmoj en la okuloj kaj rakontis al li, ke sur la strato infanoj mokis pri mi, ĉar mi portis okulvitrojn pro ia nereguleco de miaj okuloj. Tiam mi estis naŭjara knabo kaj eble mi ne komprenis ankoraŭ, ke Esperanto estas kiel la okulvitroj por la homaro, kaj kvankam dum ĝia infaneco ĉiu mal-spritulo profitas de okazo por mokado tamen nenia forto igos nin ĝin forlasi, se ĝi estas utila kaj necesa.

El : la ora numero de „Brita Esperantisto”, laŭ speciala permeso de ties eldonintoj, la Brita Esp. Asocio, Londono, kiuj tamen rezervas ĉiujn rajtojn.)

---

## NEDERLANDA OFICEJO « ESPERANTO EN LA LERNEJOJN »

La 2-an de Oktobro fondiĝis suprenomita oficejo.

La prezidantecon por la unua jaro akceptis S.ro P. W. Baas („Leen”) kaj la vic-prezidantecon S.ro H. Damen („N. K.”), dum la organizaj reprezentantoj nomis direktoro S.ron P. J. Sneeuwen, Valeriusstraat 109<sup>2</sup>, Amsterdam-Z. Jen do la adreso de nia oficejo, kiu celas akceli la enkondukon de Esperanto en la lernejojn.

Ni do petas, ke el la tuta mondo oni sendu al ni la materialon, el kiu ni fosu la necesajn armilojn por nia batalo.

## LA FORKURO AL EGIPTIO.

Tre malproksime en unu el la orientaj dezertoj kreskis antaŭ multaj, multaj jaroj palmo, kiu estis eksterordinare alta. Ĉiuj migrantoj tra la dezerto ne povis ne halti por admiri la palmon, ĉar ĝi estis multe pli granda ol aliaj palmoj, kaj oni plejofte diris, ke ĝi certe fariĝos pli alta ol la obeliskoj kaj piramidoj.

Kaj tiu granda palmo, solece rigardanta super la dezerto, iun tagon ekhavis antaŭ la okuloj ion, kio balancigis al ĝi la grandegan foliaron sur la maldika trunko pro miro. Malproksime ĉe la rando de l' dezerto alvenis du solecaj homoj. Ili estis ankoraŭ tiom malproksime, ke kameloj je tiu distanco ŝajnus esti ne pli grandaj ol formikoj, sed ili certe estis homoj. Du, kiuj estis fremdaj en la dezerto, — ĉar la palmo konis la dezerto-loĝantojn; viro kaj virino sen gvidistoj, ŝarĝobesto, tendo, aŭ eĉ provizosako.

„Vere,” diris la palmo al si mem, „ili ambaŭ venis ĉi tien por morti.”

La palmo jetis rapidan rigardon ĉirkaŭ si.

„Mirigas min tio, ke la leonoj ankoraŭ ne persekutas tiun kaptaĵon. Sed ankoraŭ nenie mi vidas iun. Mi ankaŭ ne vidas unu el la dezertaj rabistoj, sed certe ili venos. Atendas ilin sepobla morto,” pensis la palmo. „Leonoj ilin manĝegos, serpentoj ilin mordos, pro soifo ili pereos, sabloventego entombigos ilin, rabistoj mortigos ilin, sunfrapo ilin trafos kaj la timo forprenos de ili la vivon.”

Kaj ĝi provis ekpensi ion alian, ĉar la sorto de tiuj homoj faris ĝin melankolia. Sed en la tuta dezerto, kiu etendiĝis ĉiudirekten ĉirkaŭ la palmo, estis nenio, kion ĝi ne jam konis kaj vidis dum mil jaroj. Nenio alia povis kapti ĝian atenton. Ree la pensoj de la palmo iris al la du vaguloj.

„Pro la sekeco kaj la ventego!” diris la palmo, alvokante la du plej danĝerajn malamikojn de la vivo, „kion havas tiu virino surbrake? Mi kredas, ke tiuj stultuloj eĉ infanon havas kun si.”

La palmo, kiu estis malmiopa, same kiel maljunuloj kutime estas, vere bone estis vidinta. La virino tenis sur la brako infaneton, kiu apogis la kapon al ŝia ŝultro kaj dormis.

„La infano eĉ ne portas sufiĉe da vestoj,” diris la palmo. „Mi vidas, ke la patrino malligis sian veston kaj metis ĝin ĉirkaŭ la infano. Ŝi prenis ĝin pro granda urĝo el ĝia liteto kaj forkuris kun ĝi. Nun mi komprenas: tiuj homoj estas forkurantoj.”

„Tamen ili estas stultuloj,” daŭrigis la palmo. „Se anĝelo ilin ne gardas, ili prefere devus atendi la plej malbonan el siaj malamikoj,

ol eniri la dezerton. Mi povas prezenti al mi, kiel ĉio okazis. La viro estis laboranta, la infano dormis en la lito, la virino iris eksteren por alporti akvon. Veninte ekster la pordo, ŝi vidis malamikojn alkurantajn. Ŝi enkuris la domon, ekprenis la infanon kaj kriis al la edzo sekvi ŝin kaj ŝi mem ekfuĝis. De post tio ili kuris la tutan tagon kaj certe ne ripozis unu momenton. Jes, certe tiel okazis, sed tamen mi diras : — se anĝelo ilin ne gardas...

Ili estas tiom timemaj, ke ankoraŭ ili ne sentas lacecon aŭ alian suferon, sed mi vidas, kiel la soifo radias el iliaj okuloj. Mi konas vizaĝon de soifanta homo tro bone."

Kaj kiam la palmo pensis pri la soifo, iris konvulsio tra ĝia longa trunko kaj la multaj pintoj de ĝiaj longaj folioj krispiĝis, kvazaŭ ili estis super fajro.

„Se mi estus homo," la palmo diris, „mi neniam kuraĝus eniri la dezerton. Kiu riskas veni ĉi tien, ne posedante radikojn, kiuj povas atingi la neniam sekiĝantaj akrovejnoj, devas esti tre kuraĝa. Eĉ al palmoj povas esti danĝere ĉi tie. Eĉ al palmo, kia mi estas.

Se mi povus konsili al ili, mi petegus ilin reiri. La malamikoj ne povas esti tiom kruelaj, kiom la dezerto. Eble ili opinias, ke estas facile vivi ĉi tie. Mi tamen scias, ke eĉ mi ne senpene tenis min vivanta. Ankoraŭ mi memoras, kiel en mia juneco ventego ĵetis sur min tutan monton da sablo. Preskaŭ mi sufokiĝis. Se estus eble al mi morti, tiam jam estus veninta mia lasta horo."

La palmo daŭre pensis aŭdeble kiel maljunuloj kaj soleculoj kutime faras.

"Mi aŭdas mirige melodian susuradon tra mia foliaro," ĝi diris, „ĉiuj pintoj de miaj folioj devas tremi. Mi ne scias, kio kortuŝas min pro la vidado de tiuj malfeliĉaj fremduloj. Sed tiu malĝoja patrino estas tre bela. Ŝi memorigas min pri la plej mirakla, kion iam mi travivis."

Kaj dum la folioj daŭre tremis en melodia susurado, la palmo ekmemoris, ke iam, antaŭ tre longe, du belegaj homoj vizitis la dezerton. Ili estis la reĝino de Saba, kiu estis veninta ĉi tien, kaj la saĝa Salomono. La bela reĝino reiris al sia lando; la reĝo akompanis ŝin ĉi tien kaj nun ili devis sin adiaŭi.

„Memore al tiu ĉi momento," diris tiam la reĝino, „mi nun metas kernon de daktilo en la teron kaj mi volas, ke el ĝi ĝermos palmo, kiu kreskos kaj vivos ĝis kiam en Judio leviĝos reĝo, pli granda ol Salomono." Kaj dirinte ĉi tion, ŝi metis kernon en la teron kaj ŝiaj larmoj malsekigis ĝin.

„Kiel povas esti, ke ĝuste hodiaŭ mi ekpensas pri tio,” diris la palmo. „Ĉu la virino estas tiom bela, ke ŝi memorigas min pri la plej bela el ĉiuj reĝinoj, pri ŝi, kies vortoj vivigis kaj kreskigis min ĝis tiu ĉi tago?”

„Mi aŭdas ĉiam pli fortan susuradon tra mia foliaro,” diris la palmo, „kaj tio sonas malgaje kiel mortkanto. Ĝi estas kvazaŭa antaŭsigno. Estas bone, ke mi scias, ke tio ne koncernas min, ĉar mi ne povas morti.”

La palmo opiniis, ke la susurado de la foliaro koncernas la du solecajn migrulojn. Kaj ankaŭ ili mem certe kredis, ke la lasta horo por ili alproksimiĝas. Oni povis vidi tion laŭ la esprimo de ilia vizaĝo, kiam ili preteriris unu el la kamelskeletoj, kiuj kuŝis je ambaŭ flankoj de la vojo. Oni povis vidi tion laŭ la rigardoj, kiujn ili ĵetis al kelkaj preterflugantaj vulturoj. Certe okazos. Ke ili devos perei...

Ili ekvidis la palmon kaj la oazon kaj rapidis tien por trovi akvon. Sed fine alveninte, ili kurbiĝis pro malespero, ĉar la fonto estis sekiginta. La elĉerpita virino metis la infanon sur la teron kaj plorante eksidis sur la randon de la fonto. La viro sin ĵetis apud ŝi sur la teron kaj batis per ambaŭ pugnoj la senakvan grundon. La palmo aŭdis, ke ili interparolas pri la morto, kiu kaptos ilin ĉi tie.

La palmo aŭdis ankaŭ, ke la reĝo Herodo igis mortigi ĉiujn dukaj tri-jarajn infanojn pro timo, ke la granda atendita reĝo de Judio estas naskiĝinta.

„Ĉiam pli laŭte susuras miaj folioj,” diris la palmo. Baldaŭ venos por ĉi tiuj malfeliĉaj forkurantoj la lasta horo.”

Ĝi aŭdis ankaŭ, ke ili multe timas la dezerton. La viro diris : „Estus pli bone ne foriri kaj batali kontraŭ la soldatoj, ol rifuĝi en la dezerton. Ni havus pli facilan morton.”

„Dio helpos nin,” diris la virino.

„Ni estas solecaj inter rabobestoj kaj serpentoj,” diris la viro. „Nek manĝaĵon, nek akvon ni havas. Kiel Dio povus helpi al ni?”

Li disŝiris siajn vestojn pro malespero kaj premis la vizaĝon al la tero. Li estis sen espero, kiel iu, kiu havas mortigan vundon en la koro.

La virino sidis rekte, kun la manoj plektitaj ĉirkaŭ la genuoj. Sed la rigardo de siaj okuloj, kiam ŝi observis la dezerton, esprimis senfinan malesperon.

La palmo aŭdis, ke la melankolia susurado en ĝia foliaro ĉiam pli fortiĝas. Certe ankaŭ la virino ĝin aŭdis, ĉar ŝi levis la kapon kaj rigardis al la foliaro de la arbo.

„Ho, daktiloj, daktiloj!” ŝi kriis.

Sonis tiom granda sopiro en ŝia voĉo, ke la palmo deziris esti ne pli granda ol rubusujo kaj, ke la daktiloj estu tiom facile antingebblaj kiel la fruktoj de rozujo. Ĝi sciis, ke inter ĝia foliaro pendas grandaj aroj da daktiloj, sed kiel tiuj homoj povus grimpi tiom alten? La viro jam vidis, kiom nevenkeble alte pendas la daktiloj. Li eĉ ne levis la kapon. Li petegis sian edzinon ne deziri la neebulon.

La etulo certe ne povis imagi, ke la patrino ne ĉion, kion ŝi deziras, povas akiri. Tuj kiam li aŭdis paroli pri la daktiloj, li ekrigardis la arbon. Sian frunton sub la helaj bukloj li preskaŭ sulkigis. Fine glitis rideto trans la vizaĝeto. Li trovis la rimedon. Li aliris al la palmo, karesis ĝin per la maneto kaj diris per sia ĉarma infanvoĉeto :

„Palmo, klinu vin, palmo, klinu vin.”

Kaj kio okazis, kio fariĝis? La palmo bruis, kvazaŭ uragano skuis ĝiajn branĉojn kaj tra la longa trunko iris tremo post tremo. Kaj la palmo sentis, ke la etulo estas potenca super ĝi. Ĝi ne povis rezisti al li. Kaj ĝi klinis sian longan trunkon antaŭ la infano, same kiel la homoj klinas sin antaŭ reĝoj. Kun grandega kurbiĝo ĝi malleviĝis al la tero kaj fine ĝi tiom malsupreniĝis, ke la granda foliaro kun la tremantaj folioj tuŝis la sablon de la dezerto.

La infano ŝajnis ne esti mirigita aŭ timigita, sed kun ĝojkrio li alkuris kaj deŝiris unu aron da daktiloj post alia el la supro de la maljuna palmo. Kiam li jam sufiĉe deŝiris kaj la arbo ankoraŭ restis kuŝanta sur la tero, la knabeto ree iris al la trunko, karesis ĝin kaj diris per sia plej ĉarma voĉeto :

„Levu vin, palmo, levu vin, palmo.”

Kaj la granda arbo respektplene kaj silente rektigis sin, dum ĉiuj folioj kantis kiel harpoj.

„Nun mi scias, por kiu ili ludas la mortmelodion,” diras la maljuna palmo en si mem, kiam ĝi ree staris rekte. „Ne por unu el tiuj ĉi homoj.”

Kaj la viro kaj la virino kuŝis sur la genuoj kaj laŭdis Dion.

„Vi vidis nian timegon kaj forprenis ĝin. Vi estas la fortulo, kiu klinas trunkon de palmo kiel kanon. Kiun el niaj malamikoj ni timos, kiam vi ŝirmas nin?”

La unuan fojon post tio, kiam karavano venis tra la dezerto, la vojaĝantoj vidis, ke la foliaro de la palmo estas sekiĝinta.

„Kiel povis okazi?” diris unu vojaĝanto. „Tiu ĉi palmo ne mortus, antaŭ ol ĝi vidis reĝon, pli grandan ol Salomono?”

„Eble ĝi vidis tian,” diris alia el la vojaĝantoj.

(Kristo-legendoj de S. Lagerlöf.)

VANE.

# ENIGMOJ

Por komentantoj.

- |                     |                      |
|---------------------|----------------------|
| 1. x konsonanto     | 6. x konsonanto      |
| 2. x x x trinkaĵo   | 7. x x x sufikso     |
| 3. x x x x x koloro | 8. x x x x x planedo |
| 4. x x x sufikso    | 9. x x x ulo         |
| 5. x vokalo         | 10. x vokalo         |


8 kaj 8 estas vortoj, tre konataj al la esperantistaro.

Stompeteren (Ned.)

MEESTER.

Inter la ĝustaj solvintoj ni lotumos 2 premiojn.

Por progresintoj :



a, a, d, d, e, e, e, e, e, f, f, g, i, i, k, l, l,  
n, n, o, o, o, o, o, o, p, p, s, s, t, t, t,

La vortoj signifas, horizontale kaj vertikale :

1. rakonto pri malnovaj okazintaĵoj.
2. deziro manĝi.
3. fabela birdo.

T. Sv. Martin (Ĉ.S.R.)

D. VOJO.

Inter la ĝustaj solvintoj ni lotumos 2 premiojn.

Solvajn ni akceptos ĝis 1 februaro.

## LA SOVO EL No 4.

1. septembro
2. esperanto
3. inkmakulo

La premiojn gajnis : S.ro Pierre Cossec, Le Guilvinec (Franc.) kaj S.ro F. J. Lindsen, Rotterdam (Ned.).

## AL LA ABONANTOJ DE „L. J. V.”, KIES ABONOJ FINIGOS 1 JAN. 1938.

Ĉiu abonanto, kiu pagis sian abonkotizon al „L. J. V.” por la jaro 1938, antaŭ 1 februaro 1938, profitos la ŝancon gajni unu el jenaj esperanto-verkoj, kiujn ni lotumos inter la frupagintoj (ankaŭ novaj abonantoj, kiuj pagis sian kotizon antaŭ 1 Febr. rajtas partopreni) : Fundamenta Krestomatio, Kandid, Sur la Verda Vojo, Verama Raporto pri la German-Molsa Milito, Komuna Kantlibro, La Avo, Rusaj Noveloj, Kongresaj Paroladoj (de Dro Zamenhof), binditaj jarkolektoj „L. J. V.”, kantaroj „L. J. V.”, ktp.

Per via tuja pago vi do povas gajni belan esperanto-libron, kaj vi multe plifaciligas nian administradon !

**Varbu nun novajn abonantojn !**



## Marŝritme.

## 7. JUNULARA MARŜO.

1: G 5 | 1 3 5 . 6 | 5 4 5 3 3 | 2 3 4 . 3 |  
 Tra vej - noj vikle fluas sango, Ĉar junaj ni, ne

2 1 7 6 5 5 | 1 3 5 . 6 | 5 4 5 3 3 |  
 scias pri zorgoj! Por mon - tri ti - on al vi ĉi - u - j Ni

2 . 2 3 4 | 5 . 0 5 | 5 . 6 7 1 | 2 . 0 5 |  
 kantas do laŭ dec'. En ki - u ajn me - di' Sen

7 . 1 2 3 | 4 . 0 5 | 1 3 5 . 3 | 3 3 2 3 4 6 4 |  
 zorgaj restos ni, Ni kantas laŭte, ĉiu devas aŭdi: En

6 . 6 5 . 5 | 4 . 4 3 2 | 1 . 0 ||  
 kna - ba jar' Vi ĝu - u, ju - nu - lar'!

Ni restas forte kunligitaj,  
 Malpac', kvereloj restas for  
 de ni.  
 Nin regas vere dolĉa sento,  
 Amika harmoni'.  
 Komprenu ĝin de nun,  
 Aperos tiam sun'.  
 La bela tasko, nobla pro la celo  
 Fortigas por  
 La granda vivlabor'.

Eĉ kiam en la maljuneco  
 Malvikle fluas sango pro la aĝ',  
 Jen kelkaj karaj rememoroj  
 Radios sur vizaĝ'.  
 Subtenos ili nin  
 Ĝis al la vivofin'.  
 Rebrilos ĉiam la infana tempo  
 En lasta hor'  
 Kaj forta vivdolor'.

(André 1900, Nederlando).

Trad. J. v. SCHEEPEN.

\*) El : Internacia Kantaro „La Juna Vivo”.

Prezo : 0,35 gld. aŭ tri respondkup.

**Por komencantoj.****PLI BONE.**

Preteriranto : „Kial vi ne donas pecon de via pomo al via frateto?”

Knabo : „Li ricevos la kernojn. Tiujn li povas semi kaj post kelkaj jaroj li havos tutan fruktarbejon.”

**„NE KOMPRENAS”.**

Malriĉega germano venis al Amsterdamo per serĉi laboron. Li elspezis preskaŭ ĉion kaj posedis nur unu markon.

Mirigite li haltis antaŭ belega domo. Al preteriranto li demandis: „Al kiu apartenas ĉi tiu domo?” La amsterdamano rapidis, kaj respondis : „Ne komprenas”.

La fremdulo malrapide iris pluen kaj venis al la haveno. Tie li vidis belegan, grandan ŝipon. Al ŝipisto li demandis, al kiu apartenas la ŝipo. La viro ne havis tempon kaj respondis rapide : „Ne komprenas”.

„A,” ĝemis la kompatindulo, „kiom riĉega estas ĉi tiu sinjoro Nekomprenas! Kiel mizera estas mia sorto kompare kun lia !”

Malgaja kaj malkontenta li paŝis pluen. Post kvin minutoj li renkontis funebran procesion. Momenton li rigardis, kaj demandis al sinjoro : „Kiun gravan personon oni entombigas?”

La sinjoro, ne komprenante la germanan lingvon, respondis : „Ne komprenas”.

Kompatinda Nekomprenas, pensis nia amiko, kiom nun valoras al vi via riĉaĵo! Kiu scias, kiom longe vi estis malsana. Via mono ne povis savi vin. Mi estas malriĉa, sed feliĉe tiel sana kiel fiŝo ! Kaj multe pli gaja li daŭrigis sian vojon.

Kiu venis al Amsterdamo? Kion la germano serĉis en Amsterdamo? Ĉu la germano estis riĉa? Kiom da mono li posedis? Kie li haltis? Ĉu li sciis, kiu loĝas en la domo? Ĉu li informiĝis pri la loĝantoj? Al kiu li petis informojn? Ĉu la amsterdamano ĝuste informis lin? Ĉu la fremdulo rapidis pluen? Kien li iris? Kion li vidis tie? Kia estis la ŝipo? Ĉu la germano sciis, al kiu apartenas la ŝipo? Al kiu li petis informojn? Kion respondis la ŝipisto? Kion pensis la germano? Ĉu li estis prava? Kia li estis? Kien li iris? Kion li poste vidis? Ĉu li informiĝis, kiun oni entombigas? Al kiu li petis informojn? Ĉu la sinjoro komprenis la germanan lingvon? Kion li diris? Kion pensis nia amiko? Kial li poste estis pli gaja?

## LA PUNO

„Sinjorino, via hundaĉo mordis pecon el mia pantalono kaj tute detruis ĝin.”

„Tido, tido! Maltaŭgulo! Nun mi punos vin. La tutan semajnon vi ne rajtos porti vian ruĝan rubandeton!”

---

## LA MALPACO

Du knaboj, Karlo kaj Petro, ambaŭ grandaj fantaziuloj, sidis kviete en herbejo kaj gardis la ŝafojn. Ili parolis pri tio, kion ili faros, kiam ili estos plenkreskaj.

„Sciu,” diris Karlo, „poste mi aĉetos kelkajn bovinojn. Tiuj bovinoj naskos bovidojn, kaj post kelkaj jaroj mi havos grandan brutaron!”

„Kaj mi,” diris Petro, „mi aĉetos grandan kampon. Tie mi kulturos avenon. Tiun avenon mi vendos, kaj por la mono mi aĉetos duan, trian kampon. Tiel mi fariĝos granda terposedanto!”

„Bonega ideo,” diris Karlo, „sed atentu kaj zorgu, ke vi faru fortan barilon ĉirkaŭ viajn kampojn. Alie miaj bovinoj venos en vian avenon, kaj formanĝos ĉion.”

„Se tio okazus, mi rompus al ili la krurojn. Ne, ne, amiko, faru vi barilon ĉirkaŭ viajn herbejojn.”

„Mi lasas miajn bestojn libere paŝtiĝi. Ne kuraĝu ataki ilin, alie vi sentos, ke mi havas fortajn pugnoj!”

„Mi absolute ne timas vin, knabeto! Per kelkaj batoj mi kuŝigas vin sur la tero!”

Ambaŭ salte leviĝis kaj post kelkaj momentoj furioze batalis. Post la batalo Karlo havis bluan okulon kaj Petro sangantan vangon. La postan tagon la aliaj lernejoj knaboj demandis, kio okazis. Kiam ili rakontis ĉion, iliaj amikoj kompreneble ege priridis ilin.

Parizo (Franc.)

LECHELLE.

Kie estis la knaboj? Kion ili faris tie? Ĉu ili silentis? Pri kio ili parolis? Kion faros Karlo? Kion li poste havos? Kion aĉetos Petro? Kion li faros kun la aveno? Kio li fariĝos? Kion konsilis Karlo al li? Kial li devos fari barilon ĉirkaŭ la kampojn? Kion respondis Petro? Ĉu Karlo intencis konstrui barilon ĉirkaŭ la herbejojn? Ĉu Petro timis Karlon? Kio okazis? Kiel ili aspektis post la batalo? Kiuj priridis ilin?


---

Subtenu La Internacian Junularlaboron, mendu viajn librojn ĉe la redakcio de „La Juna Vivo”! (Petu senpagan libro-liston!).



## INTERNACIA JUNULARKUNVENO


Sendube fariĝos gaja societo, kiu kunvenos en Groet en la somero 1938, de la 14a ĝis la 21a de aŭgusto. Imagu : francaj, anglaj, belgaj, holandaj kaj alilandaj gejunuloj, kiuj parolos en la sama lingvo, la amata lingvo de Zamenhofo. Kaj certe ili ankaŭ



ridos en la sama lingvo de la juna kaj gaja koro. La dunoj reeĥos ilian kantadon. Ili uzos la „Juna Vivo“-kantaron, kiu enhavas tiom multe da junularkantoj. Jam nun ni forte konsilas al ĉiu partoprenonto aĉeti la libreton. Ĉiu jam nun komencu ekzerci la kantojn: tiel ili ja povas antaŭĝui la feston.

La libreto kostas 35 cendojn. Grupoj ricevos rabaton.

En la venonta numero sekvos pli da sciigoj pri la kunveno.



## LA KOKO

- |  |  |
|--|--|
| <p>1. En tempo jam fora<br/>         Min koko fru-hora<br/>         Vekadis per : Ki-ki-ri-ki<br/>         Kaj estis solena<br/>         Ĉi voĉo matena,<br/>         Ĉi dolĉa kaj sorĉa kok-kri'.</p> | <p>2. Gi akre eksonis<br/>         Sed panjo tuj donis<br/>         Maizon al ku-ku-ri-ku,<br/>         Por ke ĝi silentu<br/>         Kaj voĉe ne tentu<br/>         Fileton dormantan kun ĝu'.</p> |
|--|--|
3. Gu' pasis rapide  
 Nun zorgoj senbride  
 Mokride min vekas per bru'.  
 Ho dolĉa kok-krio,  
 Ho sonĝovizio,  
 Neniam revenos vi plu !

Zagreb (Kruatujo), Jugoslavujo.

Josip VELEBIT.




---

 SKRIBA KURSO DE LA JUNA VIVO

Legantoj, ĉu ĉiu el vi jam faris sian devon kaj varbis anojn por la skriba kurso, kiun la redakcio eldonis? Mi kredas, ke ne! Ne diru, ke vi ne havas okazon. Via sukceso grandparte dependas de via laboremo! Kelkaj fervoraj propagandistoj enskribis pli ol dudek kursanojn. Ekzemple : S.ro Krüger en Ter Apel (21), S.ino v. d. Kommer, Winkel (24), S.ro Zonneveld en Limmen (21), S.ro de Kuier en Volendam (23), tute trankvile sed konstante laboris en malgrandaj lokoj kaj akiris tian belegan rezultaton. Ilia ekzemplo estu instigo al vi ekstreme streĉi viajn fortojn. Ĉiu donu siajn fortojn al la venko de nia movado!

La alvoko en la cirkulero kaŭzis miskomprenon. Kelkaj opinias, ke la varbtempo daŭras nur tri monatojn. Ni tamen volonte akceptos lernantojn dum la tuta jaro !

**Petu propagandamaterialon !**



## KORESPONDADRESOJ

**Belgujo** : Okaze de letervespero (12-1-'38) ni atendas viajn let., kart. Flandrema Grupo Esp., Stefaniestr. 44, Antwerpen.

**Ĉeĥoslovakujo** : L. Jedličková, 17 jara studentino de komerc-akademio, dez. kor. kun tutmondaj samideanoj. Tešetice ĉe Olomouc.

**Danujo** : Kiuj gesam-anoj volas kor. pri eventuala vizito al dana banloko, aŭ gastigo de kelkaj danoj. B. Sörensen, Tasker, Skern.

**Estonio** : Diversaĝaj, profesiaj anoj, k. gekursanoj dez. interŝ. fotojn, p. k., ŝlosilojn k. esperantajojn. S.ro Simson, Riia 76, Pärnu.

**Nederlando** : S.ino J. ten Vaanholt, Drienerstr. 28, Hengeloo, dez. interŝ. poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj. Resp. certa.

**Nederlando** : S.ro J. Meester dez. kor. per let. kun hungaroj, jugoslavo kaj latvoj. Adr. : Noordevaart, Stompeteren.

**Nederlando** : S.ro Fr. Patisk, Waubacherweg 2, Eygelshoven, dez. kor. kun Hungarujo, Portugalujo kaj interŝ. il. gaz. kaj poŝtmarkojn.

**Nederlando** : La infangrupo „La Verdaj Pigoj”, Gouda, aranĝos let.-vesperon je la 25a de dec. Certa resp. P. Becker, Winterdijk 15a, Gouda.

**Nederlando** : S.ro Jos. v. Wunnik, Gebr. Moorsweg 8, Maastricht, dez. kor. per il. poŝtk. Kiu sendas foton de ŝtatestro, ricevos il. gazeton.

**Nederlando** : S.ro H. Hubers, Boompjes 11 (achter) sendos al ĉiuj, kiuj sendas 100 malsamajn pm., saman kvanton.

**Nederlando** : F.ino A. v. Niekerk, 19-jara, Gravestr. 12, Wassenaar, dez. kor. aŭ interŝ. il. poŝtk. kun ĉiuj landoj. Respondo certa.

**Nederlando** : S.ro J. Kuypers, Dunantstr. 23B, Rotterdam-W., dez. kor. kun „sokolo” el Praha, partoprenonto en la „Sokolo”-festo '38.

**Francujo** : dez. kor. en ĉiuj (vivaj, mortaj, artefaritaj) lingvoj germankaj latindevenaj, P. J. Krüger, Yv. Bruc, Servières, par Mende (Lozère).

**Nederlando** : C. Suter, Emmastr. 8, Barneveld (Gld.), dez. kor. Mi certe respondas al ĉiu, kiu skribis antaŭ la apero de la januara numero.

**Nederlando** : Esperanto-klubo de Montfort aranĝos letervesperon je la 14-a de januaro. Resp. certa. Th. Cremers, Hoogstr. 44, Montfort (L.).

**Portugalujo** : S.ro Ant. Fern. da Costa, R. Castela Branco Saraiva, Vila Gadanho 11, Lisbono, dez. kor. interŝ. il. poŝtk. ktp.

**Svedujo** : Mi dez. kor. kun gek. doj de Islando, U. S. A., Meksiko, Afriko, Arabia, Aŭstralio, Sud-Ameriko, K. G. Blomberg, Odensgat 33, Fallköping.

**Italujo** : S.ro Angiolo Carlesi, Uliveto, Pisa, dez. kor. per il. poŝtk. kun gesamideanoj de ĉiuj landoj.

**Francujo** : S.ro Guérin, S. E. S., Gare de Niort, Deux-Sèvres, 35 jara fervojisto, dez. kor. kun fervojistoj en ĉiuj landoj.

**Jugoslavujo** : Mi dez. kor. per il. poŝtk. k. let. kun tutmondo. Resp. certa al ĉiu F-ulo. Brezovšek Bogomir, Dol. Logatec 66, Slovenio (19-jara).

**Nederlando** : S.ro G. v. Leeuwen (elektristo), Leusden B 78, Amersfoort, dez. kor., ŝakludi per letero, interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn.

**Nederlando** : S.ro C. J. Geytenbeek, Voorstraat 16, Woudenberg (butikisto) dez. kor., prefere pri muziko, ŝakludi per letero interŝ. il. poŝtk.

**Nederlando** : Tiu, kiu sendas al mi poŝtm. aŭ poŝtk. ricevos 10 div. hol. poŝtm. Chr. J. v. d. Hoek, W. Kinderdijk E 319, Alblasserdam.

**ANONCETOJ (30 c. por ĉiu linio).**

**SKRIBA KURSO** por A. kaj B. (nur por holandlingvanoj). Tre detala B-kurso. Gvidanto S. Aarse. Petu senpagan prospekton. Ĉiu kandidato sukcesis. La Verda Stelo, Radioweg 45, Amsterdam-O.

**XX-a JUBILEA I. K. U. E. KONGRESO** okazos en LJUBLJANA, JUGOSLAVIO. 23.-28. VII. 1938. Aliĝkotizo Din. 50 (2 guld.). Informojn donas : Damjen Vahen, sekretario de L. K. K., Ljubljana, Reslova 29, Jugoslavio. (Okaze de respondezirdemandletoj bonvolu aldoni int. respondkuponon).

**TUTMONDA ASOCIO DE GEINSTRUISTOJ ESPERANTISTAJ (TAGE)** propagandcele kolektas infandeseĝnaĵojn, plej diverslandajn. Indiku sur ĉiu folio la aĝon de la lernanto. Multaj kolegoj el multaj landoj helpos. Sendu ilin al : P. Korte, Schoolstr. 13, Veendam, Nederlando. Poste mi povos pruntedoni la kolekton al ĉiu kolego, kiu ĝin bezonas por „lerneja” kunveno.

**NENIU LINGVO SEN LITERATURO.** Plej trafe prezentas al vi nian literaturon la revuo „Literatura Mondo”. Luksa aspekto, ilustrita. Jarabono 4,50 guld. Specimeno 0,20 guld. **LINGVO LIBRO** informas vin pri ĉiu okazo en nia literaturo. Abonu ĝin kune kun viaj amikoj. Abonprezo por jaro (3 ekz. kune sendataj) 0,80 guld. Specimeno 0,10 guld.

**„INTERNACIA KANTARO—LA JUNA VIVO”.** 34 kantoj kun muziknotoj, praktika formato. Prezo 0,35 guld. Dum la vintro la grupoj kunvenas — do oni bezonas kantaron. Kaptu la okazon : Mendu kantaron por ĉiu grupano, kaj ni liveras ilin por 0,25 guld! Ne prokrastu, mendu tuj!

**AL BERGEN (N. H.).** La sekva „Norda Stelo” — Kunveno okazos la 9-an de januaro en Bergen. Mi konsilas al ĉiu esperantisto en la ĉirkaŭjo viziti ĉi tiun (dumtagan) kunvenon. Petu programon kaj detalajn informojn ĉe la sekretario : S.ro Mandemaker, Asterstraat 3, Alkmaar.

**„KUDLAGO”, la malgranda eskimo,** verkita de la konata ned. verkistino N. v. Hichtum, trad. de S. D. Mannoury. Jen interesa verketo pri la vivo de la eskimoj sur Grenlando. Pro la simpla rakontmaniero la libreto tre taŭgas por komencantoj. Prezo nur 0,38 guld. (afrankite).

**VOLENDAM.** La Unuiĝo por Fremdultrafiko en Volendam eldonis tre belan, ilustritan prospekton (kun esperanto-teksto) pri ĉi tipa nederlanda vilaĝo. La prospekto estas havebla ĉe : „V.V.V.” Volendam, Ned. Al esperantistoj volonte servos la esp. klubo „Volendam antaŭen”, Noordeinde 75, Volendam, Ned.

**ORA NUMERO DE „BRITA ESPERANTISTO”.** Belaspekta, 48 paĝa libro. Bonkvalita papero kun belaj ilustraĵoj. Altvalora enhavo (Vidu paĝon „Rememoroj pri mia patro”). Tre rekomendinda libro. Prezo nur 0,30 guld.

**REMBRANDT, La MAGIISTO.** Ĉi famkonatan, belege ilustritan libron oni dum decembro kaj januaro povas aĉeti por nur 1,80 guld., eksterl. 1,90 guld. (Normala prezo 2,40 guld.!). Mendu la libron al red. „La Juna Vivo”.

En la dua MEB-serio aperis :

11. **Paroladoj de la ora jubilea Kongreso.** Elektis kaj aranĝis Julius Glück.

12. **Nordnordaj fabeloj,** de J. Thézard, ilustrita de la aŭtoro.

13. **En la vagono** kaj aliaj rakontoj, de Ivan Ŝirjaev.

**Prezo** : po 35 c. Tuta serio (10 ekz.) : 2,50 guld. Ambaŭ serioj (20 ekz.) kune 4,50 guld. La libretoj estas mendeblaj al

**J. MUUSSES, Purmerend (Ned.)**

**JARKOTIZO POR 1937/1938.**

Argentino : 2 pes.; Aŭstrio : 3,20 ŝil.;  
Belgujo : 14 fr.; Ĉeĥoslovakujo : 17 Kčs;  
Ĉinujo : 2 dol.; Danujo : 2,50 kr.; Estonio : 2,50 kr.; Finnlando : 25 finn. mark;  
Francujo : 14 fr.; Japanujo : 2 jen; Italujo : 10 l.; Jugoslavio : 25 din.; Norvegujo : 2,50 kr.; Polujo : 3,20 zl.;  
Svedujo : 2,20 kr.; Svisujo : 2,10 fr.;  
Usono : 0,60 dol.

**BONVOLU SENDI LA MONON POR „LA JUNA VIVO” :**

**Aŭstrio** : F. Scheibenreiter, Hermannsgasse 31/26, Wien VII.

**Belgujo** : H. Rainson, Mechelen, Belga ĝironumero 335183.

**Britujo** : The British Esp. Association, Inc. 142 High Holborn, London W. C. I.

**Brazilio** : S.ino lêda de Morais, Placa de Republica, 54 1a, Rio de Janeiro.

**Britujo** : „Brita Laborista Esperanto Asocio”, E. A. Evans, 70, Hyde Grove, Manchester, 13.

**Ĉeĥoslovakujo** : Esperanto Asocio, Praha XIX, Uralské nám. 447. Poŝtĉekkonto 12.371.

**Danujo** : S.ino M. Jensen, Galtrup, Erslev, ĝironumero 44593.

**Estonio** : Esperanto-Asocio de Estonio, Tallin, Poŝtkast 6.

**Francujo** : M. Mathieu, Dijon, 27, Place de la République, Côte d'Or.

**Hungarujo** : P. Balkanyi, Budapest, V., Nagy Sándor-u 6.

**Japanujo** : Japana Esp.-Instituto, Tokio, Hongo-Motomaĉi, Poŝtĉekkonto : Tokio 11325.

**Jugoslavujo** : P. Golobiĉ, Instruisto, Jesenice-Fuzine.

**Latvujo** : Ludmila Jevsejeva, Riga, Reformiatoru, iela 14, dz. 5.

**Maroko** : S.ino Irene Fink, 41 Bd. Moulay Jousef, Casablanca.

**Norvegujo** : Norvega Esp.-Ligo, p/a S.ro G. Johannessen, Skappelsgate, 5, Hamar.

**Polujo** : Librejo-Eldonejo, Esp. Fako, S.ro N. Szapiro, Warszawa, Nowolipki Nr. 8. Poŝtĉekkonto : Warszawa 16.562.

**Svedujo** : John Karlsson, Berga, Vasterhaninge. Sveda ĝironumero 72295.

**Svedujo** : Eldona Societo Esperanto, Stokholm 1, Box 698, ĝironumero 578.

**Svedujo** : Sveda Esperanto-Oficejo, Barnhusgaten 8, Stokholm.

**Svisujo** : R. A. Dasen, 19a Avenue Riant-Parc, Genève ĝir. 1.6256.

**Usono** : Amerika Esp.-Instituto, 1111 Brooke Road, Rockford, Illinois.

**Ĉiu, kiu varbas 5 novajn abonantojn je nia revuo, ricevos donace jarabonon aŭ jarkolekton de „La Juna Vivo”.**

Presejo A. Hessens, Bruselo.